

# *Esperanto en Danio*

13-a jarkolekto • n-ro 1 • februaro 2006



**Nia venonta kongresejo en Malmö:  
Popolalternejo de Kvarnby, Industrigatan 4**

## **Esperanto en Danio**

membroorgano de  
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

### **Adreso de la asocio/prezidanto:**

Ileana Schrøder  
Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16

✉ [dea@esperanto.dk](mailto:dea@esperanto.dk)

Ĝirokonto: 805 7370

UEA-kodo: deaa-t

### **Kromaj estraranoj:**

Ina Schultz (kasisto)

Jytte Sunekær (sekretario)

Ejnar Hjorth (vicprezidanto)

Bent Jensenius

Rasmus Høyrup Jensen

Jens S. Larsen

### **Redakcia adreso:**

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 24 47 50 40

✉ [eed@esperanto.dk](mailto:eed@esperanto.dk)

### **Presado:**

Kjeld Steffensen, Malmö

### **Adresŝanĝoj al:**

Ina Schultz

Bredagervej 21, 3.th., 2770 Kastrup

☎ 32 52 19 58.

✉ [ina.schultz@get2net.dk](mailto:ina.schultz@get2net.dk)

**Represo de artikoloj el EeD estas  
permesata kun indiko de la fonto.**

**Limdato por la venonta numero:**

**01.05.2006**

# **Enhavo**

## **Lande**

<b>Jarkunveno en Malmö.....</b>	<b>3</b>
<b>“Konstante frapante...” .....</b>	<b>7</b>
<b>Kontakto al partia junularo....</b>	<b>9</b>
<b>Dana Socia Forumo 2006 .....</b>	<b>10</b>
<b>Korpo, animo kaj spirito en Aalborg .....</b>	<b>10</b>
<b>Gazeteltondaĵoj.....</b>	<b>11</b>
<b>Forpasis Poul Thorsen.....</b>	<b>12</b>

## **Loke**

<b>Kopenhago.....</b>	<b>13</b>
<b>Næstved .....</b>	<b>15</b>
<b>Århus .....</b>	<b>17</b>

## **Monde**

<b>Forpasis Frans Makkink.....</b>	<b>19</b>
<b>Esperantaj eroj en pola koncerto .....</b>	<b>19</b>
<b>Lanĉiĝis Esperanta televido..</b>	<b>20</b>
<b>GEA 100-jara .....</b>	<b>25</b>
<b>Mallonge .....</b>	<b>26</b>

## **Anoncoj**

<b>Deziras korespondi .....</b>	<b>27</b>
---------------------------------	-----------

## Lande

### Jarkunveno en Malmö 25-28/5 2006

#### *Komuna kongreso de svedaj kaj danaj esperantistoj – 100-jara jubileo de Sveda Esperanto-Federacio kaj Klubo Esperantista de Malmö*

En 2006 Sveda Esperanto-Federacio kaj Klubo Esperantista de Malmö (KEM) 100-jariĝos! Por festi tion ni invitas la svedajn kaj danajn esperantistojn kongresi en Malmö.

Ni ĝojas ke Dana Esperanto-Asocio akceptis okazigi sian jarkongreson kune kun ni. Espereble estos multe da fruktodonaj kontaktoj inter svedoj kaj danoj!

#### **Malmö**

Malmö estas rapide kreskanta urbo en la Sunda regiono. En la lastaj jaroj estis konstruita la ponto inter Malmö kaj Kopenhago kaj “Turning Torso” estas unika konstruaĵo videbla preskau de ĉie en la urbo. Fama estas ankaŭ “Bo 01” kun sia moderna arkitekturo ĉe la maro. Belegaj estas la grandaj parkoj kaj kun plezuro ni invitas vin al nia bela urbo en

eble la plej bela tempo de la jaro.

#### **Kongreso dum 4 tagoj**

La kongreso komenciĝos ĵaŭde 25/5 posttagmeze per vizito en la ejo de KEM kaj interkona vespero en la kongresejo, Popolaltlernejo Kvarnby. Dimanĉe la 28/5 la kongreso tradicie finiĝos post la ĝisrevida lunĉo, sed estos ebleco fari postkongresan viziton en Kopenhago samtage.

#### **Kongresaj ejoj**

La kongreso okazos en Popolaltlernejo Kvarnby, sufiĉe proksime al la centro de la urbo. Je kelkminuta promena distanco vi trovos Jörgen Kocksgymnasiet kaj la preĝejo Sankt Pauli, lokoj por la inaŭguro kaj diservo.

#### **Kongresa temo**

La temo estos “Lingvaj problemoj en EU” kaj ĝin

pritraktos kompetentaj esperantistoj: Seán Ó Riain, Irlando, Povilas Jegorovas, Litovio kaj Georgo Handzlik, Pollando, kiu krome distros per muziko.

### **Distraĵo**

Koncertoj okazos kun La Perdita Generacio, oficiale malfermita ankaŭ por la Malmöanoj. Muzikos ankaŭ Georgo Handzlik. Kim Henriksen dancigos nin post la festmanĝoj.

### **Programo**

#### *Ĵaŭde 25/5*

- 15.00 Dokumentoj haveblas en kongresejo
- 15.30-17.00 Malfermita domo de KEM
- 18.00- Interkona vespero – interalie filmo pri la UK 1948, muzika distraĵo

#### *Vendrede 26/5*

- 09.00 Estrarkunsidoj de SEF kaj de DEA (nepublikaj)
- 10.00 Jarkunsido de ILEI
- 11.00 Junularaj kunvenoj de SEJU kaj de DEJO
- 12.00-13.30 Lunĉo
- 14.00-17.00 Inaŭguro – Salutparoladoj, muziko, festprelego de Seán Ó Rian
- 18.30 Komuna supeo
- 20.00 Eta danckurso, aŭkcio

21.00 Koncerto, publika por la urbanoj, kun La perdita generacio kaj Handzlik

#### *Sabate 27/5*

09.00-12.00 Jarkunvenoj de SEF kaj de DEA

### Ĝenerala Kunveno de Dana Esperanto-Asocio 2006

#### **Provizora tagordo**

1. Elekto de kunvengvidanto
2. Raporto de la estraro
3. Jara kalkulaĵo
4. Proponoj\*)
5. Elekto de prezidanto
6. Elekto de estraranoj kaj de anstataŭantoj
7. Elekto de 2 revizoroj kaj 1 antataŭanto
8. Eventualaĵoj

\*) *Proponoj al la ĝenerala kunveno devas esti ricevitaj de la prezidanto plej malfrue la 6-an de majo 2006.*

12.00-13.30 Lunĉo

13.30-15.00 Prelego – kongresa temo

15.30-17.30 Ekskurso per pramo Rundan sur la kanalo de Malmö

19.00 Komuna supeo

20.30 Muziko, eta danckurso

21.00 Koncerto, publika por la urbanoj, kun La perdita generacio/Handzlik

*Dimanĉe 28/5*

08.30 Jarkunsido Eldona

Societo

08.30-9.30 KELI, Diservo en

Pauli preĝejo

09.30-12.30 Prelegoj – kon-

gresa temo

12.30 Ĝisrevida lunĉo

13.30 Postkongreso en

Kopenhago

*La programo estas provizora kaj ŝanĝoj povas okazi. Alternativaj programoj estos promenoj en Malmö kaj ludo de petanko.*

### **Manĝoj**

Ĉiuj manĝoj okazos en la kongresejo kaj nia kuiristo, Peter Bankhom, estas konata pro siaj bongustaj mangaĵoj.

### **Tranoktado**

La partoprenantoj mem mendas sian hotelon. Ni rekomendas Quality Hotel, kiu situas apud la koncerta domo je 15-minuta promeno de la kongresejo, tlf. 040-6646000. Indikante “Esperanto-kongreso” vi ricevos rabaton.

Rigardu [www.agado.net](http://www.agado.net) por aliaj pli malmultekostaj alternativoj, precipe por la unua nokto!

Alian hotelon vi povos mendi telefone 040-341200 aŭ

rete [www.malmo.se/hotell](http://www.malmo.se/hotell) aŭ [www.metrotravel.se](http://www.metrotravel.se).

Gejunuloj povos senkoste tranokti en la kongresejo kun propra dormosako!

### **Aliĝo**

Vi aliĝas al la kongreso plenigante la aliĝilon. Se vi tion faros plej malfrue la 31/3 la kotizo estos malpli alta.

### ***Danoj aliĝas per DEA.***

### **Kiel vojaĝi en Malmö**

Per aŭtobuso nr 7 vi povas iri de la Centra stacio ĝis Värnhemstorget, de kie eblas dum 10 minutoj promeni al la kongresejo. Ĉe la lasta haltejo de tiu aŭtobuso situas la klubejo de KEM.

Mapon kaj proponitajn taksiojn vi vidos en [www.agado.net](http://www.agado.net).

### **Pliaj informoj**

En la retpaĝo de Sunda Esperanto-Agado (SEA) ni planas daŭre aktualigi novaĵojn pri la kongreso kaj estos ebleco aliĝi per ĝi.

Informojn vi ankaŭ povas ricevi de la kongresa sekretario Karin Lindquist, telefone 040-980120 aŭ rete:

[karin-lindquist@telia.com](mailto:karin-lindquist@telia.com).

Vidu ankaŭ [www.agado.net](http://www.agado.net).

*Sten Svenonius*

## **Proponita tranoktado**

Hoteloj (ĉiuj estas en promena distanco de la kongresejo)

### **Quality Hotel**

Amiralsgatan 19 ĉe la Koncertejo, telefono 040-664 60 00

Menciu "esperanto-kongreso" ĉe la mendo.

	Ĵaŭdo/vendredo 25/5	Vendredo/sabato 26/5	Sabato/dimanĉo 27/5
Unulita	1.160 svedaj kronoj	450 sv kr	450 sv kr
Dulita	1.430 svedaj kronoj	650 sv kr	650 sv kr

Estas ebleco por kroma lito je la kosto de 180 kronoj nokte.

Matenmanĝo estas inkluzivita.

### **Formule 1**

Lundavägen 28, telefono  
040-930580 inter 7-12-a horo kaj  
17-21-a horo:

[www.hotel/formule1.com](http://www.hotel/formule1.com)

Kostas 330 sv kr por 1 ĉambro  
kaj nokto. (Por 1-3 personoj la  
tuta kosto estas 330 sv kr).

Matenmanĝo kosta kromajn 35  
kronojn.

### **Cityroom & Apartments**

Amiralsgatan 12, tlf. 040-795 94,  
rete [cityroom@telia.com](mailto:cityroom@telia.com) kaj  
[www.cityroom.se](http://www.cityroom.se).

Ĉambro por unu persono kosta  
375 sv kr, pliaj personoj 275  
kr/persono (rekomendinde estas  
mendi je 2-3 monatoj antaŭ la  
kongreso). Kuirejo, necesejo kaj  
duŝo estas komuna.

Matenmanĝon oni preparas mem.

### **Alternativo:**

Mendo de hoteloj en Malmö  
eblas per telefono 040-341200  
[www.malmo.se/hotellbokning](http://www.malmo.se/hotellbokning)  
aŭ telefono 077-4474700  
[www.metrotravel.se](http://www.metrotravel.se).

### **Migrulhejmoj**

(ne situas je promena distanco)

### **Villa Hilleröd**

Ängdalavägen 38,  
tlf. 040-265626,  
rete: [www.villahillerod.se](http://www.villahillerod.se).  
190-245 sv kr por unu lito.  
100 sv kr por kroma lito.

### **STF**

Backavägen 18,  
telefono 040-82220  
130-340 sv kr nokte (kroma  
kosto por nemembroj 45 sv kr).

## “Konstante frapante...”

### *Partopreno en la Librofoiro de Kopenhago*



DEA partoprenis la Librofoiron de Kopenhago dum la semajnfino de la 18-a ĝis la 20-a de novembro 2005 kun tre bona sukceso.

La Librofoiron ĉiujare vizitas tre multaj personoj, kaj ni disdonis centojn da flugfolioj kaj ekzemplerojn de Esperanto-Nyt al scivolemaj preterpasantoj.

Dimanĉe matene prof. Robert Phillipson prelegis pri lingva politiko en Europo kaj

pri sia libro “Ĉu nur-anglalingva Eŭropo?”. Antaŭvidante intereson inter la publiko eklerni Esperanton, ni ofertis al la interesitoj por-komencantan kurson okazontan en januaro, kaj pluraj tuj aliĝis.

Dum la foiro regis entute tre agrabla etoso, kaj ni estis precipe kontentaj pri la fakto ke ni povis persone interparoli kun novaj homoj kaj rakonti pri la lingvo kaj pri la agado de la movado.



*Ileana Schröder kun prof. Phillipson*

## **Kursano rakontas**

Laŭ mia opinio januaro ĉiam estas la plej teda monato pro la terura vetero kaj la postkristnaska deprimado! Ŝajnas al mi, ke por eviti tion, la plej prudenta ago estus aŭ la migrado suden kiel la hirundoj aŭ la vintro-dormo kiel la kokcineloj. Tamen ĉi-jare, dum du tagoj, mi tute forgesis la vintron en la daŭriga Esperanto-kurso gvidata de prof. Radojica Petrović el Beogrado, organizita kunlabore inter DEA kaj ILEI. Ĝi okazis en du vendredoj, la lastan en januaro kaj la unuan de februaro, en la kursejo Nøragermindecentret en Amager. (Dum la semajnfino Radojica tie gvidis ankaŭ pedagogian trejnseminarion kaj dum la semajno vesperan kurson por komencantoj en la urbo).

Ni estis dek du progresantoj kiuj antaŭgojis la defion plulerni Esperanton per la natura metodo. Kvankam ĉiuj antaŭgojis la kurson, ni estis kompreneble iomete antaŭtimemaj. (Ĉu ni vere estas progresantoj? ktp). Sed ni rapide spertis, ke Radojica bonhumore kaj kapable trovas la aferojn en kiuj oni bezonis helpon. Ni diligente studis la tutan tagon, forgesante tamen nek la lunĉpaŭzon, nek la mallongan piedpromenon. Posttagmeze unue ni grupe interparolis, tiam ni raportis al la aliaj grupoj pri la interparolo. Ĉiam, kiam oni amuziĝas, la tempo rapide pasas. Je la kvara posttagmeze Radojica adiaŭis al ni donante la hejmtaskojn.

La duan tagon senantaŭtimeme ni reenkontiĝis kaj ni matene korektis la hejmtaskojn. Estis tre utila ekzerco, ĉar ni multe lernis pri la gramatiko, precipe la akuzativo, kiu verŝajne estas la plej granda problemo por danaj Esperantistoj. Posttagmeze Radojica montris al ni diversajn bildojn, pri kiuj ni parolis kaj priskribis. Bedaŭrinde, denove la tempo tro rapide pasis.

Kion oni povas atingi dum mallonga kurso? Oni povas malkovri la lingvajn erarojn, kiujn oni devas plibonigi. Samkursano de mi konsentis, ke la plej bona tasko estis la hejmtasko. Malgraŭ ke ni havis entute nur 12 kurshorojn, ni spertis ke ni jam povas kaj kompreni kaj malrapide paroli Esperanton. Kiamaniere ni pliboniĝos? Laŭ Radojica tio okazos per vortfarado, parolado kaj legado. Arne donis al ni librojn por la lega ekzercado.

Pluraj el ni demandis, kiam okazos la venonta kurso? Laŭ mi tia demando indikas sukceson de la aranĝo. Dankindas DEA, precipe Ileana kaj Arne kiuj zorgis pri ni en la kursejo.

*Betty Chatterjee*



## **La kursestro rakontas**

Krom danoj, la kursojn partoprenis gasto el Argentino kaj alinaciaj danlandanoj venintaj el Aŭstrio, Bosnio, Britio, Kroatio, Pollando kaj Serbio. Du partoprenintoj de la komenca kurso daŭrigos la lernadon per lernu.net, kaj la ceteraj partoprenos daŭrigan kurson en KEK, kie jam daŭras alia kurso por progresantoj.

14 membroj de DEA, kiuj okupiĝas aŭ interesiĝas pri instruado, aliĝis al ILEI kaj decidis fondi danan sekcion de ILEI kun sekciestro Arne Casper-Mortensen.

*Radojica Petrović [landa-agado]*

## **Ebleco ekzameniĝi**

La kursanoj, kaj ĉiu alia interesito, havos la eblecon akiri diplomon ĉe la dana Esperanta ekzamenkomisiono, kiu organizas ekzamenojn kiam minimume 3 kandidatoj el la sama kategorio – unua- aŭ dua-gradaj ekzamenoj – anoncas sin antaŭ la 1-a de marto. Oni povas peti ekzempleron de la regularo ĉe Lis Thune, Brombærvænget 15, 2650 Hvidovre, rete:

[thuga@mobilixnet.dk](mailto:thuga@mobilixnet.dk).

Antaŭ ol aliĝi, oni devas plenumi antaŭkondiĉan gramatikan teston, kiun oni ricevos ĉe Lis kontraŭ 25 kronoj. Por esti akceptita kiel kandidato oni devas korekte plenumi minimume 70 % de la testo.

## **Kontakto al partia junularo**

KEK estis kontaktita de junuloj de “Radikal Ungdom” (la junulara sekcio de la partio “Det Radikale Venstre”), kiu interesiĝas ke ilia partio proponu Esperanton kiel la duan lingvon por ĉiuj en Eŭropo. Kim J. Henriksen kaj Ileana Schrøder havis kunvenon komence de oktobro kun kvar el ili, kie ni rakontis pri la avantaĝoj de Esperanto kaj donis bonajn argumentojn.

Dum la lasta semajnfino de oktobro okazis la jarkunveno de Radikal Ungdom, sed bedaŭrinde granda plimulto malapogis la proponon. Tamen pluraj, interalie la landa gvidanto, montris intereson, kaj la grupeto deziras inviti nin denove por paroli al pli granda grupo iam dum la printempo.

*Kim J: henriksen*

## Dana Socia Forumo 2006

“Monda Socia Forumo” (MSF) estas la nomo de tre grandskala kunlaboro inter nombro da sufiĉe diversaj, sed similcelaj sociaj movadoj de la tuta mondo. Ĉi-jare, en januaro, MSF okazis en tri urboj samtempe: Bamako (Mali), Caracas (Venezuelo) kaj Karaĉi (Pakistano – ĉi-lastata tamen estis reduktita pro tertremo). Jam antaŭe Esperantistoj partoprenis en MSF, kaj ĉi-jare ilia agado estis rimarkita en Bamako kaj Karaĉi.

Krom la tutmondaj Forumoj okazas ankaŭ naciaj, kaj DEA partoprenis la Danan Socian Forumon kiu okazis de la 3-a ĝis la 5-a de februaro 2006 en la gimnazio de Frederiksberg. DEA havis budon kaj aranĝis du atelierojn (“workshops”): ‘Lingvomorto aŭ lingvomortigo’ (prezentitan de dr.phil. Tove Skutnabb-Kangas) kaj ‘Lingvoj de enmigrintoj en Danlando – ĉu la tut-

mondiĝo signifas ke la dana lingvo malaperos?’ (prezentitan de Ole Stig Andersen kaj prof. Robert Philipson).

Estis pli ol cent atelieroj dum la semajnfino, do eble ne estas tiel mirinde ke tiujn de DEA ĉeestis malpli ol dudeko da homoj. Aliflanke temis pri homoj ege interesitaj, kiuj faris multege da demandoj. Ankaŭ ĉe la budo estis multe da pozitiva intereso, ne laste de junaj studentoj kaj lingvistoj.

Oni povas vidi la tutan programon ĉe: [www.socialforum.dk](http://www.socialforum.dk)



## Korpo, animo kaj spirito en Aalborg

Post budoj en la Librofoiro kaj la Dana Socia Forumo, DEA atingos partopreni eĉ trian ekspozicion antaŭ ol viziti Malmö en majo por renkonti la membraron kaj la najbarlandajn samideanojn. Jen:

**Dana Esperanto-Asocio kunlabore kun Esperanto-Asocio de Norda Jutlando partoprenos en “Krop-Sind-Ånd Helse-messen” en Europahallen, Aalborg, 3.-5. de marto 2006.**

Temas pri loka filio de la plej granda dana alternativa foiro.

# Gazeteltondaĵoj

**Oktoebro** (aldone al la antaŭa menciitaj):

Nacia poŝtmarka ekspozicio *Vejle Frim '05*: Esperanto bygger bro over sprogbarrieren. Benny Nielsen, Næstved, ekspoziiis esperantaĵojn (foton vidu sur la dorsa paĝo de EeD n-ro 4/2005). Fabelo *La malbela anasido* en 11 lingvoj (i.a. en Esperanto) en biblioteko de Næstved menciita 3-loke en Næstved-medioj.

**Novembro**

*La malbela anasido* menciita 2-loke en Næstved-aj komunikiloj.  
Prelego de Hans Jørgen Kristensen menciita 3-loke en Næstved-aj komunikiloj.

Ugebladet Næstved: Asocia registro.

Radio Vatikana: Radioprogramo.

Ud at se med DSB, Seniorernes blad: Desirotog.

**Decembro**

Morgenavisen Jyllands-Posten: Ord der forener.

Krocvortenigmo en Sjællandske (= la antaŭa Næstved Tidende). kun la vorto Esperanto.

**Januaro 2006**

Stempel-info de Post Danmark Frimærker rilate *Esperanto – et mellemfolkeligt sprog*.

Ugebladet Næstved: Nyt på Esperanto.

Næstved-Bladet: Nyt fra Esperanto-nyt.

MetroXpress: Esperanto som EU-fællessprog.

Prelego de Lars Pilegaard kaj Søren Willemoes menciita 5-loke en Næstved-aj komunikiloj.

Radio-programo *Danmarksmester* elsendis Esperanto-paroladon de la SAT-kongreso en Århus 1947 kun la demando, pri kiu lingvo temas.

Daŭre sendu viajn kontribuojn al la kolektanto Grete Nielsen,  
Fyrrevænget 4, 4700 Næstved

## Forpasis Poul Thorsen (1915-2006)



Kun profunda malĝojo ni devas komuniki al vi, ke nia granda poeto Poul Thorsen forpasis lunde la 30-an de januaro 2006 proksimume je la 4-a horo en la aĝo de 91 jaroj.

Thorsen, kiu profesie estis instruisto, lernis Esperanton en 1931 kaj jam baldaŭ ekaktivis en la laborista Esperanto-movado. En 1937 li unuafoje partoprenis SAT-kongreson en Roterdamo, invitante tie al partopreno en la Kopenhaga kongreso en 1939, kiun li organizis kun Paul Neergaard.

Dum la 50-aj jaroj Thorsen gajnis plurajn premiojn en la Belartaj Konkursoj de UEA. De 1954 ĝis 1962 li gvidis la eldonejon “Koko” kaj estis kunredaktoro de la altnivela kultura-literatura revuo “Norda Prismo” de 1957 ĝis 1974. Li ankaŭ tradukis multajn danajn kantojn.

Liaj ĉefaj eldonitaj verkoj, kiujn ofte karakterizas satira humuro, estas la poemaroj “Rozoj kaj urtikoj” (1954, kun interesa dediĉo de la skota poeto William Auld), “Sen paraŝuto” (1963), “Du el” (kun Marjorie Boulton, 1985), la rakontaro “Stokita vino” (1995), kaj la rememoroj “Babile kun mi mem” (1996). Okaze de la Universala Kongreso en Kopenhago en 1956 Poul Thorsen tradukis aron de tiel nomataj GRUK de Kumbel, kaj en 1960 li eldonis libreton PLUK kun siaj propraj miniaturoj.

Grandaj hobiaj de Poul Thorsen estis, kiel li mem diris, “ekscesa vojaĝemo” – li vizitis pli ol 80 landojn – kaj fungoj, pri kiuj li longe ankaŭ estis fakdelegito de UEA. Membro de UEA li estis ekde 1947.

En 1997 li kaj lia edzino Roma donacis al UEA grandan monsumon por starigi la kason “Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen”, kiu subtenas Esperanto-bibliotekojn kiuj ne estas oficiale subvenciataj. La apogon administras UEA; en 2005 estis subvenciitaj kolektoj en Slovakio, Italio, Brazilo, Belgio, Kubo, Serbio kaj Ĉinio.

Niaj pensoj kaj kondolencoj iras al la edzino Roma, kiu ĉiam fidele, efike kaj kunlabore subtenis la agadon de Poul Thorsen.

# Loke

## Kopenhago

**KEK kaj DEFA Kopenhago** havas komunan retadreson kun la nomo [defakek@hotmail.com](mailto:defakek@hotmail.com), kiun ni malfermas antaŭ ol iri al la kunvenoj. Rakontu pri tiu adreso al viaj Esperanto-rilatuloj. Ni esperas, ke tio faciligos kontakton inter la kopenhagaj esperantistoj kaj la tuta mondo.

La unuan lundon de la monato ni kune vespermanĝas je 18.30 – kunportu mem viajn buterpanojn aŭ mendu ĉe Ruth, tel. 36 46 62 79, plej malfrue la vendredon antaŭe. La programo komenciĝas je 20.00.

---

**KEKG** kunvenas unufoje monate en Medborgerhuset, Danasvej 30 B, salono n-ro 1, dua etaĝo inter 19.00-23.00. Ĉiu prelego okazos inter 19.30-20.30.

Ĉiu prelego kostas 10 kronojn kaj la prelegoj okazos en la kutima loko en la Civitana Domo de Frederiksberg, atingebla per aŭtobuso n-ro 29 el stacio Vesterport al haltejo Danas Plads, aŭ per la Metroo el Nørreport ĝis la stacio Forum ĉe Julius Thomsens Plads, kiun oni devas laŭiri ĉ. 300 metrojn ĝis Danasvej 30B.

Demandojn pri la aranĝoj oni povas direkti al Torben Svendsen, tel: 3874 9764, rete: [kulturgrupo@webspeed.dk](mailto:kulturgrupo@webspeed.dk).

### **Instruado**

**Kursoj** por komencantoj kaj daŭrigantoj okazas en la kunvenejo de KEK kaj DEFA, Vasbygade 10. Ĉiulunde 18.45-19.30 kaj 20.00-20.45 instruas Regin Larsen, Zita Garbaravicienė kaj Kim Henriksen.

**Legogrupon** samloke estras Arne Casper ĉiulunde 19.00-19.30 kaj 20.00-20.45.

La kondiĉo por partopreni kurson aŭ legogrupon estas membreco de unu el jenaj societoj: KEK, DEFA Kopenhago aŭ DEJO. Turnu vin al unu el la du kasistoj, Karen Olsen (DEFA) kaj Egon Starup-Jensen (KEK).

Por ĉiuj interesitoj okazas du **studgrupoj** je la datoj 13/2, 27/2 kaj 13/3: (1) Laboro pri la libro de Kolker: ‘Vojaĝo en Esperanto-lando’, gvidata de Bent Wiinberg, kaj (2) Tradukado de tekstoj de H.C. Andersen, gvidata de Lene Niemann.

## **Okazos**

(La kunvenoj kiuj ne estas markitaj per KEKG, estas de KEK aŭ DEFA Kopenhago kaj okazos en la kunvenejo en Vasbygade 10).

8 feb: (KEKG) ‘Vegetarismo kaj sana nutraĵo’. Prelego de Helen Claesson kun praktikaj demonstracioj.

20 feb: Ĝenerala kunveno de KEK 2006.

6 mar: ‘Vojaĝo en tempo kaj spaco’ – Bent Jensenius prezentos la duan parton de sia lumbildprelego. Bent loĝis komence de la 70-aj jaroj dum pli ol unu jaro en Brazilo, kaj li rakontos pri siaj spertoj.

8 mar: (KEKG) ‘Bosnio-Hercegovino – geografio, historio kaj kulturo’. Prelego de Amir Hadžiahmetović.

20 mar: Ana Røssum rakontos pri Esperanto-Domo. Membrokunveno de DEFA Kopenhago.

27 mar: Egon Starup-Jensen: ‘Matematiko II’. Se vi partoprenis la la unuan parton de ĉi tiu prelego en januaro, certe vi kun ĝojo atendas la duan parton. Ankaŭ aliaj estas bonvenaj!

3 apr: Birthe Lapenna rakontos pri la esperanto-vivo en Danio ĉirkaŭ la jaro 1962, kiam okazis la UK en Kopenhago

4 apr: (KEKG) ‘Poŝtmarkoj rakontas’. Reĝo Harald decidas kristaniĝi post t.n. Dio-juĝo. Zeŭso ĵetas Kalistoan kaj Arkason ĉielen. Toro rajdas en la aero kaj decidas pri fulmo kaj tondro, pri ŝtormo kaj pluvo, pri la vetero kaj la rikoltaĵo. Al la rerakontado de tiuj historioj – kaj multaj aliaj – Mogens Rude Andersen trovis dum sia 50-jara Esperanta korespondado inspiron de diversaj poŝtmarkoj danaj kaj eksterlandaj.



## Okazis

### Honora membro de KEK

La 10-an de oktobro membroj de KEK honorigis Bodil Kühlmann per eta ujutna ceremonio en ŝia hejmo en Brønshøj. Ni dankas pro la grandega laboro kiun vi faris por KEK kaj Esperanto.

### Paroliga Kurso en Malmö 12/11

Ann-Louise tre sperte aktivigis la grupon. Ni danoj, Sooki, Betty kaj mi ekkonis aliajn svedojn. Ni aktorin, ŝerce trompiĝis kaj multe amuziĝis.

### Pri la Internacia Tago en Kopenhago

La komunumo de Kopenhago nun la 3-an fojon okazigis ĉi tiun aranĝon helpe de la integriĝ-konsulantaro. Ĝi okazis sabate 27/8-05 je horo 12-18. Ĉirkaŭ 30 invititaj grupoj povis prezenti siajn aktivecojn, kulturon kaj muzikon (ekzemple KEK, Dana-Sudslava Asocio kaj la Iraka Virina Asocio). Ĉe la aliaj budoj eblis ĝui kuirajn specialaĵojn el la tuta mondo. Multaj homoj preterpasis. Al ili ni disdonis flugfoliojn, celante ke homoj almenaŭ eksciis pri Esperanto – kun informo pri kursebleco. Kelkaj vizitis nian ekspozicion. “Esperanto-Nyt” ni havis por ili. – Inter fremdaj budoj kun bela vetero ĉe la lago ni kvazaŭ estis eksterlande.

*Jytte Sunekær*

## Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Fyrrevænget 4, 4700 Næstved, tlf 5572 1240, rete atingebla pere de: [eho-esperanto@stofanet.dk](mailto:eho-esperanto@stofanet.dk). Kunvenoj okazas principe ĉiun duan vendredon dum la monatoj septembro-aprilo en Grønnegades kaserne, Grønnegade 10B, lokalo 111, ekde h 19.30, escepte de kelkaj, kiuj okazas posttagmeze, vidu sube.

## **Okazos**

- 10 feb je h. 14:00: Gramatikaj ekzercoj, H.C.Andersen traduko de *Ugedagene*, videofilmo pri Esperanto-temo.
- 17 feb je h 20:00: Ĝeneralkunveno de EUN. La klubo regalos per kafo/teo je h 19.30.
- 24 feb je h 19:30: Danlingva prelego: Lene kaj Jan U. Niemann parolos pri 'Fervoje laŭ montoj supren kaj malsupren'. Lum-bildserio kun travivaĵaj komentoj. Anoncota al la publiko.
- 10 mar je h 14:00: Samkiel 10 feb – nur kun nova filmo.
- 24 mar je h 19:30: Danlingva prelego (temo je redaktofino ne tute kontraktita).
- 07 apr je h 19:30: Sezonfino.

## **Okazis**

- 05 nov: La nova centra biblioteko en Næstved havis dum la HCA-jaro 12 diversajn aranĝojn, por novembro voĉlegado de *La malbela anasido* en 11 lingvoj, interalie en Esperanto. Birthe Trærup legis por ni. Aranĝo vaste anoncita – vidu la *Gazeteltondaĵojn* en ĉi tiu numero (p.11).
- 11 nov: Post serioza laboro ni spektis filmon de Roman Dobrzyński: *Esperanto 1987*. Precipe interesa por ni estis la parteto de 'Bona Espero', al kiu ni siatempe sendis plurajn pakaĵojn kun vestaĵoj.
- 25 nov: Hans Jørgen Kristensen kondukis nin al Birmo (aŭ Myanmar, kiel la lando denove nomiĝas). Lando kun duontropika klimato, milda milita diktaturo kaj belegaj, imponaj vidindaĵoj.
- 09 dec: Ĉe la kristnaska aranĝo vizitis nin hungarino, nun loĝanta en Næstved, kun rilatoj al hungaraj esperantanoj. Ŝi instigis nin krei kontaktojn.



- 06 jan: La unua *posttagmeza* kunveno, dum kiu ni ordigis multajn arkivaĵojn, kiuj akumuligis daŭre de nia preskaŭ tridekjara ekzisto.
- 20 jan: La vetero malhelpis nian antaŭviditan kunvenon.
- 27 jan: Lars Pilegaard kaj Søren Willemoes prelegis danlingve pri siaj vivo kaj travivaĵoj kiel denaskaj blinduloj. Multon ni lernis pri la plejofte malfacilaj cirkonstancoj. La aranĝo estis anoncita al la publiko kun certa sukceso.

## Århus

Prezidanto: Stanisław Mielczarek, Skovgårdsvænget 125, 8310 Tranbjerg J.

Tel./fakso: 86 29 23 06. Retpoŝto: [stanislaw@ofir.dk](mailto:stanislaw@ofir.dk).

Kunvenejo: Senior-Centret, Østergade 30, 2., 8000 Århus C.

Kunvenoj: lasta (*kun esceptoj*) ĵaŭdo de ĉiu monato je la 19:30 h.

## Okazis

- 24 okt: Jonas Dalmose ne povis veni al la kunveno pro aliaj devoj. Ni do babilis Esperante kaj ankaŭ (*bedaŭrinde*) krokodilis.
- 15 dec: Zamenhof- kaj Kristnaskofesto. Stanisław Mielczarek rememorigis al ni kelkajn faktojn el la vivo de Ludoviko Zamenhof okaze de lia naskiĝdat-reveno. Poste ni kune kantis kaj ludis. Henry Simonsen, kiel kutime, elegante legis kristnaskan historieton. Fine ni povis ĝui kafon/vinon kaj kukon. Tion preparis ĉiam helpemaj Agnete kaj Jørgen Kristoffersen, Luja kaj Tomislav Miletić, Henryka Mielczarek kaj Maria Grübel. Dankon al vi ĉiuj!
- 26 jan: ‘Novjaro en mia lando’. Niaj klubmembroj devenas de diversaj landoj: Anglujo, Kroatio, Germanujo, Pollando, Irano kaj Danio. Estis do, tre interese ekkoni la kristnaskajn kaj novjarajn kutimojn en tiuj diversaj landoj.

## Okazos

23.02: Ĝenerala Kunveno en Senior-Centret, Århus, Østergade 30, II etaĝo. **Rimarku: komenco je la 19:00 horo!**

### Tagordo

0. Elekto de vortgvidanto kaj protokolanto
1. Jarraporto de prezidanto
2. Bilanco
3. Venintaj proponoj
  - a) propono de Grethe Kvist pri la ŝanĝoj en la statuto
4. Elekto de prezidanto (nuna: Stanisław Mielczarek)
5. Elekto de 2 estraranoj (nunaj: Nikoline Fiora kaj Byrial Jensen)  
kaj 1 anstataŭanto (nuna: Wolfgang Kirschstein)
6. Elekto de 2 revizoroj (nunaj: Jørgen Kristoffersen kaj Arthur Robinson) kaj 1 anstataŭanto (Tove Jyding)
7. Eventualaĵoj.

### Fonduso de Betty Jensen

1. Jarraporto
2. Bilanco
3. Elekto de 2 estraranoj (nunaj: Grethe Kvist kaj Byrial Jensen)  
kaj 1 anstataŭanto (Wolfgang Kirschstein)
4. Elekto de 2 revizoroj (nunaj: Jørgen Kristoffersen kaj Arthur Robinson) kaj 1 anstataŭanto (Tove Jyding).

*Post la Ĝenerala Kunveno la klubo regalos partoprenantojn per teo/kafo kaj kuko.*

30 apr: Esperanto-kurso – prepozicioj, kunmetitaj verboj.

27 mar: Legu kaj ridu – ŝercoj, spritaĵoj kaj aliaj amuzaĵoj.

18 maj: Ĉu la angla fariĝas la internacia lingvo?

10 jun: Somera ekskurso.

## Forpasis Frans Makkink

Gerrit Francois (Frans) Makkink forpasis la 5-an de januaro 2006 en Wageningen, Nederlando. Li naskiĝis en 1907 kaj lernis Esperanton en la 20-aj jaroj. Makkink estis biologo kaj multe aktivis por disvastigi Esperanton en la scienca mondo. Li kunfondis la nederlandan sekcion de Internacia Scienca Asocio Esperantista kaj ekde 1949 estis kelkajn jarojn kunredaktoro de “Scienca Revuo”. Al siaj sciencaj studoj li ofte aldonis Esperantan resumon.

Okaze de la Jubilea Jaro li verkis nederlandlingvan informlibreton “Esperanto honderd jaar” (Esperanto centjara; 1986). Makkink estis longtempa kunlaboranto de CED. Li verkis multajn studojn pri la lingva problemo en scienco kaj pri esperantologiaj temoj, interalie “La participoj en Esperanto” (1967), “La problemo de komunikado en la mondo” (1971), “Pri la artikolo en Esperanto” (1987) kaj “Nia Fundamento sub lupeo” (1990). Li okupiĝis ankaŭ pri esperantigo de poezio kaj grave kontribuis al “Nederlanda antologio” (1987).

Makkink estis delegito de UEA de 1946 ĝis 1994, fidela membro de Societo Zamenhof kaj mecenato de UEA. Kiel honora membro de la Asocio li estis elektita en 1988.

*Gazetara komunikado de UEA, n-ro 221*

## Esperantaj eroj en pola koncerto

Kim J: henriksen, muzikisto kaj kantisto konata el ‘Esperanto Desperado’ kaj ‘Amplifiki’, plurfoje ludis dum la finalo de la 14-a pola Granda Orkestro de la Festtempa Helpo, en kaj apud Krakovo. Tiel, verŝajne unuafoje, Esperanto-muziko aperis en koncertoj de tiu famega aranĝo, kune kun la muziko de polaj grupoj.

La “Granda Orkestro de la Festtempa Helpo” estas grandega ĉiujara decembra-januaraj (kaj verdire ĉiamdaŭra) tutlanda movado de koncertoj kaj aliaj aranĝoj. kies celo estas kolektado de mono por modernaj aparatoj por infanhospitaloj. Artistoj kaj ĉiaj organizantoj aktivigas en ĝi sen-honorarie. La aranĝo estas konata al, kaj varmkore subtenata de ĉiu polo.

*Maria Majerczak [landa-agado]*

# Lanĉiĝis Esperanta televido

*Post dujara monkolekta kampanjo, en novembro 2005 estis lanĉita la unua regula esperantlingva televidkanalo ITV, Internacia Televido. ITV elsendas siajn programojn nur tra interreto, ĉe la adreso [internacia.tv](http://internacia.tv). Ĉar la sukceso de la monkolekta kampanjo estis malpli granda ol planite, multaj el la planitaj programoj ne realiĝis. Spite la mankojn, la denaska esperantisto Svetlana Gonĉarova renkontis la novan elsendon kun larmoj de ĝojo. Kelkaj aliaj spektantoj tamen estas pli kritikaj pri la tekniko kaj enhavo de la elsendoj.*

## La planoj kaj la realiĝoj

Mankas en la program-tabelo interalie Teleĵurnalo, kiu devis iĝi la unua Esperantlingva televida novaĵ-programo. Ankaŭ ne videblas la longe disreklamita infan-programo. Flavio Rebello, la gvidanto de la projekto, diras ke pli da programoj venos poste.

– Ni planis dekomence 11 programojn por elsendo ĉe la lanĉo de ITV (kun 35 mil eŭroj en la kaso). Ni havis nur 23 mil. Do kelkaj programoj venos iom post iom, laŭlonge de la semestro. Se ni estus atingintaj 25 mil eŭrojn, ni povus lanĉi ITV-on kun la programoj Infanurbo kaj Teleĵurnalo. Pro tio, ke ni ne atingis eĉ ĉi tiun sumon, la esperantistoj devos iom paci-

enci antaŭ ol ĝui la novajn programojn.

La origina celo de la monkolekta kampanjo estis ĝuste 35.000 eŭroj, sed somere 2005 evidentiĝis ke tia rezulto ne atingeblas, kaj Flavio Rebello anoncis, ke la kanalo ĉiukaze estos lanĉita, kun malpli ambicia programaro, se estos atingita almenaŭ la sumo de 25.000 eŭroj. Tamen, ankaŭ tion ne eblis atingi. Ni demandis al Flavio Rebello, kial li decidis funkciigi la elsendojn, kvankam mankis 2.000 eŭroj.

– Simple pro tio, ke se ni perdus ĉi tiun ŝancon, eble neniam oni proponos ion similan. La vojo kolekti monon per internacia kampanjo montriĝus fiaska, kaj la koncepto mem de televido en Esperanto

estus subfosita de voĉoj, kiuj neniam kredis je la projekto. La fakto ke, spitante la atakojn kaj la mankojn de mono kaj apogo, ni lanĉis la esperantistan televidkanalon, indikas vojon por la esperantistoj – ili neniam rezignu, eĉ sub kaskado da miskonkludoj pri la agado, fare de aliaj “samideanoj”.

Flavio Rebello rakontas, ke la kanalo nun havas tri dungitojn kaj krome ricevas helpon de dudeko da volontuloj. Laŭ li, la retejo ricevas mezume 1.500 vizitojn tage, kun pintoj de 2.500 vizitoj en iuj unuopaj tagoj.

### **Kion montras ITV?**

La elsendoj de ITV almenaŭ en la komenca fazo ŝajnas grandparte konsisti el arkivaj materialoj. En du hazarde elektitaj tagoj fine de novembro oni povis spekti dudek jarojn aĝan polan dokumentan filmon pri Esperanto, la konatan kurson de Esperanto “Pasporto al la tuta mondo”, produktitan de ELNA, brazilan dokumentan

filmeton kun Esperanta traduko kaj krome senparolajn “Amuzajn videojn”.

La origina plano estis krei kvar horojn da novaj programoj ĉiutage, sed efektiviĝis multe pli limigita programaro. La programtabelo de unu tago konsistas el tri duonhoraj elsendoj, kiuj ripetiĝas unu post

la alia, entute 18-foje tage. Tamen ankaŭ dum sekvaj tagoj de la sama semajno parto el la programoj ripetiĝas, ĉar entute estas nur kvin diversaj duonhoraj programeroj, daŭre resendataj dum al-

menaŭ unu semajno.

### **Entuziasme...**

Eĉ tia magra elekto de programoj almenaŭ komence entuziasmigis multajn spektantojn. La denaska esperantistino Svetlana Gonĉarova eĉ ekploris pro la nova elsendo, ŝi rakontas al Libera Folio:

– Mi estis tiel forte impresita, eĉ ŝokita, ke larmiĝis ekde la unuaj sekundoj de spektado. Mi sentis, kvazaŭ komenciĝis nova epoko, kvazaŭ la mondo pliboniĝis, kvazaŭ ekis la bela



futuro, kie Esperanto okupas gravan lokon... Kiam mi aŭdis la vortojn “Internacia Televido” kaj vidis la enkondukon, kie tiuj vortoj “ĉirkaŭflugas” la mondon, mi komprenis, ke estas la unua vere internacia televido.

Precipe por denaskaj esperantistoj televid-elsendoj en Esperanto estas tre gravaj, opinias Svetlana Gonĉarova.

– Esperanto vivas en mi, ĝi estas parto de mi, ĝi okupas duonon de mia ekzisto (almenaŭ lingvomense, kune kun la rusa). Kiam mi vidas, ke mia gepatra lingvo Esperanto estas vaste uzata (aŭ almenaŭ ŝajnas tia dank’al ITV) mi sentas, ke multaj homoj povas pli bone kompreni min persone kaj mian/nian Esperantan komunumon, kompreni kiel bela estas tiu lingvo, kiajn belajn sentojn ĝi povas krei kaj kiom da feliĉo ĝi povas alporti.

Jouko Lindstedt, patro de tri denaskuloj kaj la gvidanto de diskutejo pri familia uzo de Esperanto, komprenas la entuziasmon de Svetlana Gonĉarova:

– Mi kredas, ke estas ia baza vero en ŝia eldiraĵo: la denaskuloj certe sentas sin iom

izolitaj, kaj ju pli multe ili vidas la lingvon en “normalaj” medioj, des pli pravigitaj ili sentas sin. “Mazi”, la unusola vidbendo vere taŭga por infanoj, estis tre grava. Enreta televido – kvankam mi tute ne konatiĝis kun la projekto, mi parolas principe! – povus fariĝi eĉ pli grava, kaj praktike kaj simbole.

### **... kaj kritike**

Iom malpli entuziasme ol Svetlana Gonĉarova reagis Bertilo Wennergren, akademiano kaj aŭtoro de la konata Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko:

– Miaj unuaj impresoj estas ne tre pozitivaj: la bildokvalito estas malbona, kaj la enhavo apenaŭ interesas min. Sed mi ne volas fari nun definitivan prijuĝon, ĉar temas pri nova afero, kiu certe povas pliboniĝi. Ofte tiaj ĉi elsendoprojektoj, ĉu en la Interreto, ĉu en ordinara televido, komence havas tre modestan kvaliton. Sed ofte ili post iom da tempo signife pliboniĝas. Cetere la elsendokvalito de interreta televido kutime estas tre malalta. Oni do pri tio ne kritiku aparte ITV-n. La nuna rapideco de interretaj konektoj

apenaŭ permesas pli bonan kvaliton.

Andrej Grigorjevskij, unu el la retaj respondeculoj de UEA, mem ankoraŭ ne sukcesis spekti la elsendon de ITV, ĉar li en Rusio ne havas sufiĉe rapidan retkonekton por tiaj celoj. Li tamen opinias la aperon de ITV principe grava paŝo, sed li timas ke la elsendoj ne vivos longe.

– Kiel fakto tio estas grava atingo. Grandega kaj tre donkiĥota laboro, antaŭ kiu eblas respekto-plene depreni la ĉapelon. Eĉ se post kelkaj tagoj, semajnoj aŭ monatoj la stacio ĉesos funkcii, tio neniel malpliigos la gravecon de la jam okazinta evento. Ekonomie kaj praktike la afero aspektas senespera, sed se tamen ĝi montriĝos vivkapabla, mi persone taksus tion eĉ plia atingo, ol la lanĉo mem, komentas Andrej Grigorjevskij.

### **Kio fariĝos poste?**

Ni demandis al Flavio Rebello:

*Kiom da spektantoj necesus, por ke la projekto iĝu nemalprofita?*

– La problemo ne estas “kiom da spektantoj”, sed kiom da landoj spektos ITV-n. La granda atuto de ITV estas la internacieco de la publiko. Kaj jes, ni jam havas tri proponojn de reklamoj, kaj estas aliaj kontaktoj, kiuj evoluas cele al reklamado, li rakontas.

*Kiel longa tempo laŭ via takso necesos por atingi la necesan kvanton de spektantoj? Ĉu la kolektita mono sufiĉos por vivteni la kanalon ĝis la*

*atingo de sufiĉa spektantaro?*

– Ni laboras kun ses-monataj celoj. Nia nuna celo estas superi la vizitadon de Ĝangalo (pli ol 109 mil personoj en oktobro) jam en majo 2006. Pri la mono, ni uzas ĝin tre konsekvence, por ŝpari kiom eble plej multe. Sed kompreneble ĝi finiĝos, kaj ni jam antaŭvidas aliajn manierojn enspezi por ke la televidkanalo esperantista neniam fermu la pordojn. Unu afero tamen estu klara – neniam oni bezonos



aboni aŭ pagi ion ajn por spekti la Internacian Televidon, diras Flavio Rebello.

### **Teknikaj infanmalsanoj**

Post la lanĉo de ITV en la reto aperis multaj plendoj de esperantistoj, kiuj spite multajn provojn ne sukcesis vidi ion en la retejo de ITV. Aparte multajn problemojn havis uzantoj de Linux kaj Macintosh, tamen ankaŭ uzantoj de Internet Explorer spertis malhelpojn.

Jens S. Larsen, dana kontribuinto al la monokolekto de ITV, ne sukcesis aŭdi la sonon de la kanalo, kaj ankaŭ la bildon li atingis nur per la programo Mozilla Firefox, ne per la ordinara Internet Explorer. Laŭ li, ITV impresas iom malriĉa, tamen funkcias – simile al Monato, kiu origine volis esti semajna revuo.

### **Eksteraj eĥoj**

La starto de ITV estis rimarkita ankaŭ ekster Esperantujo, atentigas Flavio Rebello.

– La reagoj estis tre bonaj. Ni havis tre pozitivan raporton pri ITV kaj Esperanto en la franca regiona televidkanalo France3. Estas tekstoj pri ITV, plejparte tre favoraj, en pli ol 30 retejoj

en la mondo, kaj en pli ol 18 lingvoj. La celo de Internacia Televido estas ankaŭ montri al la mondo, ke Esperanto estas ne nur vivanta lingvo, sed ja interesa kulturilo. Per tiaj raportaĵoj, ni sukcesas parte kovri ĉi tiun nian celon.

### **Stirado de la informfluo**

Laŭ informo en la retejo de ITV, Pola Televido lastatempe konsentis iĝi “partnero” de Internacia Televido kaj disponigi al ITV grandan kvanton da programoj. Por ekscii pli pri tiu “partnereco” Libera Folio turnis sin ankaŭ al Teresa Liberska, kiu laŭ la retejo de ITV peris la kontakton kun Pola Televido. Flavio Rebello tamen tuj instrukiis s-inon Liberska ne respondi la demandojn de Libera Folio pri la temo.

– Nia reprezentantino Teresa Liberska ĵus informis al mi, ke vi ankaŭ sendis kelkajn demandojn al ŝi. Mi jam instrukiis al ŝi respondi nenion, tial ke la administracio de Internacia Televido funkcias laŭ centralizita maniero, diris Flavio Rebello. Li ankaŭ mem rifuzis respondi pliajn demandojn pri la temo.

*[el Libera Folio, mallongigita]*



# GEA 100-jara

## ***Invito al la 83-a Kongreso de 100-jara GEA, Braunschweig, 2-5 junio, 2006***

En 2006 GEA festos sian 100-jaran jubileon en sia “naskiĝloko”, nome en Braunschweig, kie ĝi estis fondita la 19an de majo 1906.

Germana Esperanto-Asocio kaj la LKK, kunlaborante kun la urba gvidantaro de Braunschweig, invitas najbarajn kaj aliajn landajn asociojn por kune memori tiun historian eventon.

La Germanaj Esperanto-Kongresoj prezentas diversajn interesajn temojn pritraktatajn per prelegoj kaj diskutrondoj, kaj spertindan vesperan programon. Krom la festprelego de d-ro Ulrich Lins okazos prelegoj de d-ro Werner Bormann, d-ro sc. Detlev Blanke, Wera Blanke, Peter Chrdle, Zlatko Tišljarić, fakkunsidoj, ekumena diservo, kulturaj programoj (klasika muziko de Trio el Herzberg, dancmuziko, koncerto de grupo Asorti el Litovio), kaj kompreneble urborigardado en Braunschweig, ekskursoj al la ĉirkaŭaĵo: Wolfenbüttel, Gifhorn, Herzberg.

Profitu la vojaĝon por resti iom pli longe kaj vizitu la aŭtomobilan centron de Volkswagen aŭ la ekspozicion “phaeno” en Wolfsburg (25 km), restadu kelkajn tagojn en la vivoplena ĉefurbo Berlino (220 km) aŭ partoprenu la postkongresajn tagojn en Herzberg inter 6-9 junio, vizitante la Germanan Esperanto-Centron/Interkulturan Centron (kun Esperanto-biblioteko kaj arkivo) kaj ripozu dum ekskursoj, migrado en la Nacia Parko Harz.

Detalojn pri la kongreso, aliĝilon vi povas trovi ĉe la kongresa hejmpaĝo:

[www.jubileagek.ic-herzberg.de](http://www.jubileagek.ic-herzberg.de)

Ni esperas je digna, memorinda jubilea festo, kun multnombra germana kaj alilanda partoprenantaro.

Aliĝu ĉe:

Interkultura Centro Herzberg

D-37412 Herzberg/Harz

Grubenhagenstr. 6,

Tel: +49/(0)5521-5983

[www.ic-herzberg.de](http://www.ic-herzberg.de)

[esperantodk]

## Mallonge

- La Internacia Infana Kongreseto (IIK) okazos apud Florenco 29 julio–5 aug 2006. La aliĝilo troveblas ĉe <http://bertosch.free.fr/iik2006/index.html>.
- La 15-an de januaro la televida kanalo DR 1 montris program eton pri la sitkomo de la artista duo “La Loko”. La artistoj nun estas en Bankoko, kie ili organizas tajan-Esperantan amikec-asocion – vidu ilian taglibron ĉe <http://www.laloko.dk>.
- Pri la 28-a *Ĉebalta Esperantista Printempo* en Mielno apud Koszalin, Pollando (13.-21. junio), la organizantoj mem diras: “La aranĝo impresos vin forte pro ne ripetbla esperantista etoso kaj riĉa programo. Ĝi donos al vi bonegan okazon por profundigi vian lingvonon, ligi novajn amikajn kontaktojn kaj agrable pasigi la tempon ĉe la Balta maro.” Konvinkiĝu ĉe [www.esperanto.kozalin.pl](http://www.esperanto.kozalin.pl).
- Internacia Esperanto-Muzeo IEMW estis remalfermita la 1-an de decembro 2005 en sia nova adreso: Palaco Mollard, Herrengasse, AT-1010 Vieno. Antaŭ la malfermo oni okazigis gazetaran konferencon la 25-an de novembro.
- La movado en Nederlando pasintjare iĝis centjara. Okaze de tiu jubileo la 26-an de oktobro la televido "Nederland 3" montris specialan elsendon pri Esperanto, daŭrinta duonan horon.
- Ĉu vi bezonas la paperan aliĝilon de la venonta Universala Kongreso en Florenco?? La printebla dosiero estas je via dispono ĉe [http://www.uea.org/pdf/alighilo\\_florenco.pdf](http://www.uea.org/pdf/alighilo_florenco.pdf).
- “La Amikeco” estas interesa retgazeto de la orient-azia junulara Esperanto-movado. Ĝi naskiĝis en vintra renkontiĝo inter la esperantistoj vjetnamaj, koreaj kaj japanaj okazinta en Vjetnamio fine de 2003. Legu ĝin ĉe <http://www.la-amikeco.net/>.
- La ĉiam aktiva Litova Esperanto-Asocio atentigas pri grava scienca konferenco “Lingvo, diverseco kaj integriĝo de plivastigita EU”, okazonta en Kaunas 12-14. de majo. Prelegos interalie prof. R. Philipson kaj, espereble, nombro da kompetentaj esperantistoj.

## Anoncoj

### Deziras korespondi

Estimataj samideanoj

Mi kontaktis vian Esperanto-asocion celante trovi geinterkorespondemulojn. Mi vivas en la sudo de Brazilo, en Ŝtato Rio Grande do Sul (Granda Rivero el la Sudo).

Mi naskiĝis en la jaro 1965, kaj nuntempe mi estas publika funkciulo de la brazila Respubliko. Mi interesiĝas pri la homa vivo ĝenerale, do mi povas kontakti kun iu ajn.

Je la espero de via ebla helpo, mi restas ĉiam je via dispono por io ajn en Brazilo.

Kun verdstelaj salutoj,

Marco Antonio Ferreira Teixeira

Tecnico Judiciario – 40-a Zona Eleitoral  
Santa Cruz do Sul – RS.

---

Saluton karaj geamikoj el Danio

Mi deziras ke vi fartu bone kaj estu tre gajaj ĉiam. Mi estas 19-jara kaj mi dezirus havi amikojn el via lando, ĉar mi legis en “Monda almanako de la landoj” (hispanlingva) pri via lando kaj plaĉegis al mi viaj kulturo kaj historio plenaj de riĉaĵoj. Pri multaj temoj mi povas “paroli” kaj tiel interŝanĝi konojn.

Mi atendas vian respondon. Ĝis al ĉiuj!

Andy Hernández Martínez

c. Alejandro Rodríguez

edificio 5, bloque 3, apto. 5

CP: 72810 Florida

Camagüey Cuba

---

# *El la kursa semajnfino*

---



← *Seminarianoj antaŭ la kursejo*



*Kon-  
tentaj  
kome-  
ncantoj  
kun  
atestiloj  
→*



↑ *Partoprenantoj de  
la pedagogia trejn-  
seminario ŝvitas  
super la taskoj*

*Petrović (staranta) kun siaj  
lernantoj atentege spektas... →*



← *...la prezentaĵon de Arne  
Casper kaj Jonas Dalmose.*